

4a ORDINARA DIMANĈO – 31-an de januaro 2016

JESUO, KIEL ELIJA KAJ ELIŜA, NE ESTIS SENDITA NUR AL LA JUDOJ.

- Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 4, 21-30

[En tiu tempo] Jesuo ekparolis en la sinagogo de Nazareto: "Hodiaŭ ĉi tiu Skribo plenumiĝas en viaj oreloj".

Kaj ĉiuj atestis pri Li, mirigite pro la vortoj de graco, elirantaj el Lia buŝo. Sed ili demandis inter si: "Ĉu tiu ne estas la ido de Jozefo?". Kaj Li diris al ili: "Sendube vi diros al Mi la jenan sentencon: «Kuracisto, sanigu vin mem: la mirindaĵojn, kiuj, laŭdire, estis faritaj en tiu Kafarnaumo, tiajn faru ankaŭ ĉi tie, en via patrujo». Kaj Li diris: "Pro vero Mi diras al vi: Neniu profeto estas akceptita en sia patrujo. Pro vero Mi diras al vi: Estis multaj vidvinoj en Izraelo en la tempo de Elija, kiam estis ŝlosita la ĉielo tri jarojn kaj ses monatojn kaj okazis granda malsato en la tuta lando; kaj al neniu el ili estis sendita Elija, krom al vidvino de Carfat en la regiono de Cidono. Kaj estis multaj lepruloj en Izraelo en la tagoj de la profeto Eliŝa; sed neniu el ili estis purigita, krom la siriano Naaman".

Kaj ĉiuj en la sinagogo pleniĝis de kolero, aŭdante tion; kaj leviĝinte ili elĵetis Lin ekster la urbon, kaj kondukis Lin ĝis la krutaĵo de la monteto, sur kiu ilia urbo estis konstruita, por ĵeti Lin malsupren. Sed, pasante meze de ili, Li foriris.

La evangelio de tiu ĉi dimanĉo prezentas la unuan malsukcesan predikon de Jesuo en Nazareto. Luko – kiel ni jam vidis en la lasta dimanĉo – prezentas Jesuon, kiu en Nazareto ekstaras kaj legas tre konatan tekston, tiun de profeto Jesaja (Jes 61, 1-2) anoncanta la venon de la Mesio. Sed, atinginte la versiklon *"proklami favorjaron de la Sinjoro..."*, Li haltas kaj ne legas la postan *"... kaj la venĝotagon de nia Dio"*.

Ĝuste tiun versiklon atendis la popolo, sub la Romia regado. Ni legu nun la sekvon, ĝis versiklo 30: *"Hodiaŭ ĉi tiu Skribo plenumiĝas en viaj oreloj"*, memoriganta profeton Ezekielo (Ez 12,1), laŭ kiu la popolo apartenas al *"...raso de ribeluloj... kies oreloj ne aŭdas"*. Tio estas premiso al la postaj okazaĵoj.

"Kaj ĉiuj (ĉeestantoj en la sinagogo)... atestis (la greka verbo estas "martireo", de kiu venas substantivo "martiro", konata de ni ĉiuj, kaj la atesto povas esti favora aŭ malfavora, depende de la kunteksto: ĉi tie ĝi estas klare malfavora "... kontraŭ Li, mirigite pro la vortoj de graco ...", ĉar Jesuo ne parolis pri venĝo kontraŭ la regantoj, sed nur pri graco ... elirantaj el Lia buŝo. Sed ili demandis inter si: "Ĉu tiu ne estas la ido de Jozefo?". Ili ne dubas pri la patreco de Jozefo: en la priskribo de la geneologio de Jesuo Luko mem skribis, ke Li "estis ido, kiel oni supozis, de Jozefo" Lk 3, 23)". "Ido de"... ne signifis nur "generita de...", sed ankaŭ "simila al..." ankaŭ en la konduto. Evidente laŭ la vilaĝanoj Jesuo nun ne kondukis kiel la patro, kiu verŝajne estis ŝovinisto: tiutempe la nomo Jozefo alprenis la signifon de "panterulo", do iusence "batalemulo".

Do Jesuo ne similas sian patron. Sed li ne kvietigas la ĉeestantojn, li insistas: *"Kaj Li diris al ili: Sendube vi diros al Mi la jenan sentencon: «Kuracisto, sanigu vin mem: la mirindaĵojn, kiuj, laŭdire, estis faritaj en tiu Kafarnaumo (Kafarnaumo estis urbo rivala al Nazareto, kaj "tiu" montras, ke la Nazaretanoj ĝin malestimas), tiajn faru ankaŭ ĉi tie, en via patrujo»"*. La samon oni diros al li sur la kruco *"Aliajn li savis: li savu sin mem"* (Lk 23, 35). Per termino "patrujo" Luko intencas komprenigi, ke kio okazas en Nazareto simbolas ĉion okazanta al Li en Lia lando.

"Kaj Li diris: Pro vero... (do tio estas solena aserto) Mi diras al vi: Neniu profeto estas akceptita en sia patrujo.... (Kial? Kio estas profeto? Homo kiu, sub inspiro de Dio, ne rediras okazintaĵojn, sed kreas la estontecon. Kaj tion ĉiam kontraŭstaros la pastraro reganta. Kaj nun Jesuo faras ion nefarendan. Estis du epizodoj, en la historio de Izraelo, pri kiuj oni preferis silenti. Tiam, en cirkonstancoj escepte gravaj, Dio ne helpis la

judojn, kiuj rajtis privilegiojn, sed la nerajtintojn, eĉ la paganojn. Jesuo ilin deprenas de la forgesejo: *"Pro vero Mi diras al vi: Estis multaj vidvinoj en Izraelo en la tempo de Elija, kiam estis ŝlosita la ĉielo tri jarojn kaj ses monatojn kaj okazis granda malsato en la tuta lando..."* (do ankaŭ por Izraelo); *"... kaj al neniu el ili estis sendita Elija, krom al vidvino de Carfat en la regiono de Cidono (1Reĝ 17,9-16)... (Cidono estis en pagana lando; Jesuo asertas, ke la amo de Dio estas universala, ĝi ne dependas de la loko sed rilatas ĉiujn, Dio ne rigardas la meritojn, sed la bezonon)"*.... kaj ankoraŭ *"... Kaj estis multaj lepruloj en Izraelo en la tagoj de la profeto Eliŝa; sed neniu el ili estis purigita, krom la siriano Naaman"* (2Reĝ 5.1-14). Alia pagano, estro de armeo militanta kontraŭ Izraelo. Tio estis tro por tiuj "ĉiuj", kiuj, kiel supre dirite "atestis kontraŭ li".

"Kaj ĉiuj en la sinagogo pleniĝis de kolero, aŭdante tion; kaj leviĝinte ili elĵetis Lin ekster la urbon,... (La evangeliisto anticipas, ke por Lin mortigi oni Lin forportos de la sankta urbo Jerusalemo) *"...kaj kondukis Lin ĝis la krutaĵo de la monteto, (tio memorigas monton Ciono), sur kiu ilia urbo estis konstruita, por ĵeti Lin malsupren"*. Kiam unuafoje Jesuo predikis en sinagogo, la rezulto estis, ke oni intencis Lin mortigi. Jesuo neniam riskos mortodanĝeron meze de pekantoj, de krimuloj, de rifuzitoj: la plej danĝeraj lokoj estos la religiaj. Tie oni klopodos Lin mortigi ŝtonumi, forigi. *"...Sed, pasante meze de ili, Li foriris"*. Kial Luko skribas tion? Ŝajnas strange, se ĉiuj ĉeestintoj en la sinagogo klopodas kapti Lin. Kiel Li sukcesas pasi inter ili? Ankaŭ tio estas anticipo, ĉi-foje de la resurekto: la morto ne forkaptos Jesuon, Li iros plu. Kaj ĝuste tiuj estas la lastaj vortoj de la hodiaŭa liturgio. Kien Li iras? Al Jerusalemo. De ĉi tiu rifuzo Li konstatis, ke en Sia urbo li renkontos nur kontraŭstaron, mortodanĝeron. Sed Li ne cedas: Li atestu la pardonon de Dio, la amon de la Patro, eĉ pagante per Sia vivo.